

Annette von Droste-Hülshoff,

## La printempo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Plej bela tempo estas la  
Printemp'. Ĉu io pli?  
En ora la sunbrilo ja  
Floradas ĉio ĉi.

Fandiĝas lasta neĝo jen ,  
Jam verdas ĉie ci.  
Briletas la lageto en  
Printempa sunradi'.

La birdoj kantas en la val',  
Jen krias la pirol'!  
Nun venas kara najtingal'  
Kaj ankaŭ la kukol'.

Jubilo-plenas la aer',  
Kunkantas ankaŭ mi:  
Plej bela estas primaver'!  
Ĉu io bela pli?

*Traduko de la Germana poemo "Der Frühling" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2011-04.*

*MR-523-1 / Arg-849-1714 (2013-02-28 19:22:38)*